Heinrich Heine,

# The Lorelei

*tradukita de L. W. Garnham*

I do not know what it signifies.
That I am so sorrowful?
A fable of old Times so terrifies,
Leaves my heart so thoughtful.

The air is cool and it darkens,
And calmly flows the Rhine;
The summit of the mountain hearkens
In evening sunshine line.

. . .

Heinrich Heine,

# Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

. . .

Heinrich Heine,

# Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.

. . .

Heinrich Heine,

# [Ne scias mi, kio okazis]

*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

*El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".*

Ne scias mi, kio okazis
al mia tristema kor':
Antikva legendo min kaptis,
ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
murmuras kiel mister',
la supron ŝtonegan orumas
sunbriloj de la vesper'.

. . .

Heinrich Heine,

# Lorelejo

*tradukita de Joachim Gießner*

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

. . .

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| The most beautiful Maiden entrances<br>Above wonderfully there,<br>Her beautiful golden attire glances,<br>She combs her golden hair. | Plej belan knabinon mi vidas:<br>en ora ornamo brilante,<br>sur supro de l' monto ŝi sidas,<br>la harojn mistere kombante. | Belega knabino jen tronas<br>Kun ora juvelar',<br>La belan vizaĝon kronas<br>Mirinde la ora harar'. | Plej bela virgino jen sidas<br>mirinda sur la montet'<br>kaj ŝia oraĵo radias, [4]<br>ŝi logas kiel magnet'. | Jen supre kabino provokas<br>per ora juvelar',<br>kaj ŝia beleco allogas<br>kaj ŝia ora harar'. |
| With golden comb so lustrous,<br>And thereby a song sings,<br>It has a tone so wondrous,<br>That powerful melody rings. | La oran kombilon ŝi movas<br>kaj kantas tra l' pura aero,<br>kaj forto mirinda sin trovas<br>en tiu ĉi kant' de l'vespero. | Ŝi uzas kombilon el oro<br>Kaj dume kantas ŝi.<br>Mirige tuŝas al koro<br>Sorĉiga la melodi'. | Ŝi kombas la oran hararon<br>abundan per ora kombil',<br>kantante misteran lidon, [5]<br>ravantan kiel sunbril'. | Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,<br>sirene kantas ŝi<br>per neimagebla, mirige<br>potenca melodi'. |
| The shipper in the little ship<br>It effects with woe sad might;<br>He does not see the rocky slip,<br>He only regards dreaded height. | Ŝipet' iras sur la rivero,<br>ŝipisto ektremis de l' kanto,<br>kaj blinda por ĉiu danĝero<br>rigardas li al la kantanto. | Kaj sopiregon eksentas<br>Ŝipisto dum sia vetur';<br>Rifaron li ne priatentas,<br>Al monto rigardas li nur. | Ŝipisto en sia ŝipeto<br>kaptiĝas per stranga dolor',<br>la rifon li tute ignoras.<br>atentas nur ŝin kun fervor'. | Ŝipiston en eta boato<br>Turmentas koremoci'.<br>Ne ĝenas lin rifokaskado,<br>rigardas nur supren al ŝi! |
| I believe the turbulent waves<br>Swallow the last shipper and boat;<br>She with her singing craves<br>All to visit her magic moat. | Ha, baldaŭ ŝipisto la bela<br>perdiĝis sub l' akvoturnado;<br>ĝin Lorelej' faris kruela,<br>per sia mirinda kantado. | Mi kredas, ke dronos finfine<br>Ŝipisto kun sia boat',<br>Kaj tion kaŭzis feine<br>La Loreleja kantad'. | Mi kredas: la ondoj englutas [6]<br>ŝipiston, ŝipeton je l' fin',<br>kaj kulpa pri tio nur estas<br>kantado de la virin'. | Ĝis tiras kun si al Rejnfundo<br>la ondoj lin kun boat'.<br>Nun kuŝas li en la profundo<br>pro Loreleja kantad'. |
| ... | ... | ... | ... | ... |

[4] En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia"'. Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

[5] En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

[6] Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de

. . . . . . . . . . . . . . .

Paul Christaller.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

*Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)*

*L.W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo* `http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html`.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Leopold Elb *(†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso" de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Paul Gottfried Christaller *(∗1860-08-21 – †1950-12-31).*

*Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abscbnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo* `http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller`, *kun foto de li.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-23 – †1856-02-17) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)*

*Tiu ĉi poemtraduko aperis en la kant-kolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, retadreso:* `Josef.Schiffer@t-online.de`*), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo3.*